

REVUO

Monata Aldono al Esperanto Triumfonta

NUMERO 4

1923

FEBRUARO

IAJ plej fruktodonaj originalaj Esp. verkistoj estas en la lasta tempo krom la brita *Luyken* kaj la nederlandano *Bulthuis* la hungaraj samideanoj *K. de Kalocsay* kaj *Julio Baghy*. Kvazaŭ duobla astro ili aperis sur la firmamento de l' Esperanta literatura ĉielo. Ni do supozas, ke por niaj legantoj estos interese kaj agrable, aŭdi ion pli detalan pri ilia ĝisnuna vivo kaj agado.

Unue ni prezentas bilde kaj biografies-anon J. Baghy, kiu afable donis al ni la petitajn informojn. Ni esperas, ke post kelka tempo ni povos publikigi portreton kaj biografion ankaŭ de s-ano Kalocsay.

* * *

Julio Baghy naskiĝis en Szeged (Hungarlando) la 13. januaro 1891. Liaj gepatroj kaj geavoj estis bone konataj aktoroj. Li, la sola filo, estis severe edukita kaj destinita por ia filistra profesio; sed lia senbrida, ekstrema karaktero kaj la preskaŭ malsana inklino al la teatra arto igis lin serĉi plenan liberecon sur la scenejo, kaj li fariĝis aktoro.

En 1912-a jaro li konatiĝis kun Esperanto, kies t. n. »interna ideo« kaptis lin kaj ĉenis al la movado. Post unu jaro

li gvidis sian unuan kurson en Kassa. Tiutempe, je lia peto, kelkaj el niaj eminentuloj donacis siajn verkojn al la malriĉaj gelernantoj liaj. Inter la ricevitaj libroj estis »Tra l' silento«, eternvalora poemaro de E. Privat. Tiuj ĉi poemoj ravis lin, kaj li, havante jam kelkajn bagatelajn sukcesojn literaturajn en sia patra lingvo, revis fariĝi Esperanta verkisto. La unua provo fiaskis, ĉar la redaktora kritiko sentencis: „Nek talento, nek lingva lerteco.“

Li komprenis, ke la fiaskon kaŭzis ĉefe lia lingva malperfekteco. Respekto al la lingvo estas la unua ŝtupo al sukcesoj. Dum la postaj jaroj li gvidis kursojn por diversnacionoj, ĉar la milito ĵetis lin en Ruslandon. En liaj kursoj partoprenis germanoj, turkoj, tataroj, rusoj, poloj, ĉeĥoj.

germanoj, turkoj, tataroj, rusoj, poloj, ĉeĥoj.

En 1918-a jaro li prenis denove la plumon por verki Esperante, sed sen intenco fariĝi poeto aŭ verkisto. Li verkis por siaj gelernantoj, kiuj tute ne havis Esperantlingvajn librojn por ekzerci sin.

En 1920 li fondis la Nikolsk-Ussuriskan Esp. Societon, kiu en la malproksima Oriento ludis gravan rolon en tiu tempo. Ĝiaj membroj estis rusoj, tataroj, poloj,



Julio Baghy.

Li staras antaŭ mi, kaj mi ne trovas vortojn por konsoli lin, kiu tiom ofte admonis min por pacienca tolero, kiam la vivo ŝajnas al mi jam neportebla. Li etendas al mi la manon kaj mallaŭte kun singulte tremanta voĉo parolas:

„Li volis . . . Tio estis lia lasta deziro, ke vi . . . ke vi parolu kelkajn vortojn Esperante . . . ĉe lia katafalko . . .“

Li ne povas paroli plu, kaj mi mordetante kunpremas la lipojn. Sur miaj trajtoj baraktas la emocio. Kia stranga kaj dolora deziro! . . . La patro senvorte montras al la mortinto, kaj mi nur nun rimarkas, ke sub la kunmetitaj manoj, sur la brusto kuŝas Esperanta gramatiko, steleto kaj eta verda flago . . . Miaj tempioj freneze pulsas . . . la tremantaj larmoj rulas sur miaj vangoj, kaj mia longo preskaŭ seke algluiĝas al la palato.

Unu el la funebrantoj flustre diras al mi: „Komencu, sinjoro!“

Ne! Neeble! Eĉ unu vorton mi ne povas elparoli nun . . . La funebro, la korŝiriga situacio, la ploreganta patro antaŭ mi, kaj malantaŭe la armita gardisto, mia flikojn havanta fremdlanda uniformo, la solena atendo de la scivolaj funebr-

antoj . . . ĉio ĉi katenas min. Mi ne estas plu sinjoro de mia volo. Miaj larmoj torente ekfluas, kaj ili pli elokvente interpretas minajn sentojn ol ia ajn oratoraĵo. Mian animon okupas la donaco de la mortinto: firma kredo al pli bela estonteco de la homaro. En mia koro ekbrulas neestingebla fajro: konvinkiĝo pri triumfo de la ideo, viviganta nian lingvon. Mi sentas, ke mia memo fine trovis sian celon en la vivo: esti batalanto por movado, celanta komprenon kaj mondpacon . .

La emocio venkas min, kaj mi povas elparoli nur solan vorton:

„Adiaŭ . . . adiaŭ!“

⊕

Mi malfermas la okulojn, kaj la bildoj de la pasinteco malaperas, nur la rememoro restas kaj restos por ĉiam en mia animo pri mia amiko kaj unua rusa lerninto Feodoro Nikolaeviĉ Felšov.

Nun tiel ŝajnas al mi, kvazaŭ li estus ŝtelinta sin en mian ĉambron kaj parolus al mi per la sensona neĝado . . . La neĝo! Ho, ĝi multfoje rakontas al mi malgajajn historiojn . . .

Julio Baghy.

Vintra tago.

Tiel mi amas la vintran tagon,
Jen kiam li venas
Ridanta bubeto
Kun freŝruĝaj vangoj,
Brilantaj okuloj
Ho, vera ravaĵo!

Tiam skuante de sia vesto
Aeren li ŝprucas
Kaj blovas kirlige
El plenrondaj vangoj
La blankajn neĝstelojn
Je sia plezuro.

Hejho! Vivgaja vi, ĝojportanta
Knabet' senzorgulo!
Rapidu al mi, vin
Sidigu sur miajn
Genuojn kaj lasu
Viajn ruĝajn lipojn kisi! (T. J.)

Poemoj el la plumo de J. Baghy.

Milita Fablo.

*En la sunbril' dum maja mateno,
tremante pro kares' de l' vent',
sur silkpetal' de blanka jasmeno
du rosoj sidas en silent'.*

*Flustras l' unua: „Estas mi rido,
ĝojlarmo brila de patrin',
kiu el mortoj cent de l' milito
la filon vidas nun ĉe l' sin'.“*

*Plendas la dua: „Kial vi ridas?
Okuloj blindaj naskis min...
Venis la fil', sed plu li ne vidas
vizaĝon karan de l' patrin'.“*

*Kaj la sunbril' dum maja mateno
la gemojn por la di-juvel'
prenas per kiso for de l' jasmeno
kaj portas ilin al ĉiel'...*

Ama Danco.

Li:

*Dancon petas mi, knabino,
ritman dancon nun de vi.
Sonas gurdo, tamburino,
kaj tutkore kantas mi.*

Ŝi:

*Jen la mano! Prenu, knabo!
Dancu kune vi kaj mi!
Dum dancado kaj kantado
akre sonu ĝoja kri'!*

Ambaŭ:

*En ĉirkaŭpren'
de l' danca ĉen'
ekbrulis jam
la kora flam'...
La knab', knabin'
ĉe l' danca fin'
sopiras jen
al amkatan'...*

Li:

*Ju pli ofte, des pli bone;
poste kisu min, knabin'!
Paron formi donu por mi
vin mem ĝis la vivofin'!*

Ŝi:

*Kison, knabo, mi ne donas.
Prenu por vi ŝtele for!
Ĉar la kiso, se mi donas,
vin ne ligos al la kor'.*

Ambaŭ:

*Mi estas vi,
vi estas mi
kaj vivas ni
en harmoni'...
La kis' de l' am',
la sankta flam'
ne flugos for
de nia kor'...*

Mia patro kaj mi.

*Drama aktoro estis mia patro:
sortorompita, kara maljunul',
kiu, ludante rolojn en teatro,
larmojn elvokis ĉiam al okul'.*

*Drama aktoro estis mia patro...
Mi, obeema lia fila id',
por mi elektis rolojn en teatro,
viŝi ĉi larmojn per tutkora rid'.*

Tragedieto.

*Sur lito hospitala
junulo morte pala
deliras. En ĉi horo
sopiras lia koro
je alveno via,
ho knabin'!*

*Sur lito hospitala
lin trafas sorĉ' fatala.
La kor' nur ami povis,
sed nun sin eĉ ne movis
je alveno via,
ho knabin'!*

Sableroj.

*Se okuloj kaj la mieno
sincere ekparolas,
komedion de l' arlekeno
vi ludi vane volas.*

*La tuta ĝojo de l' kruta vojo
celon perdas ĉe la fino,
sed nuda vero de l' kruda tero
donus morton al animo.*

*Homo, vèlanta super abismo, rifo,
nepre konscias pri sia sensignifo.*

*La poeto, gvidata de okula stelo,
eĉ dumtage mil stelojn vidas sur ĉielo.
Li — ho am' ĉiopova — pri lampiroj, luno
verkas kantojn ĉe l' lumo de l' brilanta suno.*

*Ĉiun idealon beligas la — mensogo.
Prenu for la veston, ĝi restos sen allogo!*

*Ĉiun viran forton — jam estas destino —
venkas per malforto plej simpla virino.*

*Se multaj konkuras vane por virin',
kies beleco vantplene akceptas psalmon,
ignore vi iru por mokridi ŝin
kaj ŝi por venĝi sin donos al vi la palmon.*

*Se vi volas havi fidindan spegulon,
al interno propra vi turnu l' okulon!*

*Kredi nur infano kutimas.
Viro agas, neniun ektimas.*

*Blasfemado Dion ne tiom ofendas,
kiom preĝo vanta, se benon ĝi mendas.*

*Fari kontrakton pri l' mondpaco;
estas firmigo de l' malpaco.*

*Ĉiu malriĉulo je mono sopiras;
ofte la riĉulo feliĉon aspiras.*

*Tablo vane estas riĉe provizita,
se la regalo estas ĉiam — prokrastita.*

Kantoj de Vagabondo.

*Tiom da larmoj kaj dolor'
ne estas en infer',
kiom mi portas en la kor'
vivante en mizer'...
Tiom da revo kaj sopir'
ne havas homa brust',
kiom prikantus mia lir',
se ĝin ne kovrus rust'...
Kial mi devas vivi do,
se estas for la ĝoj'...
erarvagante migri — ho —
sen, min savanta, voj'?!
Kial min igas songocel'
fariĝi vagabond',
kiun, pro kanto pri la bel',
mokridas — tuta mond'?!*

*Vagabond' de l' mondo estas mi,
vaganta sur la ter'.
En animo regas harmoni'
kun ĝojo kaj esper'.
Se trompas min la sortfavor'
perfidas amatin';
vagabond' de l' mondo en la kor'
mi restos ĝis la fin'...*

Ŝi.

*Se larmoj briletas en ŝiaj okuloj,
ŝajnas ploregi la tuta natur'.
Se ore ŝi ridas, la nuboj, nebuloj
pasas pelate for de l' lazur'.*

*Se ruĝe ekflamas tagiĝo sur vango,
pompe odoras la flor' de l' esper'.
Se fulme pro plendo ekbolas la sango,
ve! — jam velkiĝas la amo sur ter'.*

*Se vorton por diri malfermas ŝi buŝon,
vidas miraklon la homoj kaj Di'.
Ili nur miras pri sorĉmelodi'...*

*Ĉar voĉo, la ŝia, jam faras kortuŝon...
Pie atendas mi vorton de ŝi;
vorton premian de l' ama pasi'.*

MALFRUA SOMERO.

MALRAPIDE

J. BAGHY.

Muziko de H. Horovitz.

KANTO

1. Dol-ĉa ri-po-zo kvi-e-te si-len-ta Re-gas de-no-ve
 2. Ki-el ajn es-tu, mi ta-men ak-la-mas Eĉ se men-so-ga

GITARO

en mi-a kor' kaj la do-lo-ro kru-e-le tur-men-ta
 la ko-ra-mem, ki-un vi sen-tas, de ki-u ek-fla-mas

Pro vi-a a-mo jam flu-gis for. Eb-le last-fo-je ek-
 vi-a ko-ret' mi a-mas vin mem! Ri-du vi-vi-ge, kaj

bri-lis la su-no, Eb-le nur las-te, ne-ni-am plu.
 a-mu kor-so-le, Ki-su, ki-sa-du min ar-de nun!

La-sis mo-men-te for min la aŭ-tu-no Ri-das je mi la ĉi-
 Spi-te la vint-ro so-me-ro nur so-le Es-tu en ko-ro! Ho

e-la blu'
 mi-a sun'!

-FINO-

Konsiloj

de Epiktetos.

Vi povas esti nesuperebla, se vi ne partoprenos batalon, en kiu vi ne povas venki. Gardu vin opinii feliĉa homon tre adoratan, tre potencon aŭ famkonatan. Ĉar ĉiuj veraj bonoj konsistas en aferoj, pri kiuj ni mem estas kapablaj, envio kaj ĵaluzo estas sensencaj. Vi ja celas esti nek generalo, nek magistratestro, nek konsulo, sed vi volas esti libera. Kaj la vojo al libereco estas malestimo de ĉio, kio ne estas en nia povo.

* * *

Se vi faras ion kun forta konvinko, ke ĝi devas esti farata, ne timu fari ĝin publike malgraŭ tio, ke la opinio de la publiko estas pri tio alia. Ĉar se vi agas ne ĝuste, timu la faron; sed se vi agas ĝuste, pro kio vi timas tiujn, kiuj mal-laŭdas vin malprave?

* * *

Se iu faras al vi aŭ parolas pri vi mal-bonon, konsideru: li agas aŭ parolas tiel, ĉar li opinias, ke li pravas. Li ja ne sekvas viajn ideojn, sed la siajn, kaj se tiuj ĉi estas malĝustaj, li havas la malutilon per sia eraro. Ĉar se iu opinias la ĝustan konkludon malĝusta, tio malutilas ne al la objekto de tiu konkludo, sed al li, kiu eraras. Se vi tion konsideros ĉiam, vi kondutos kviete kontraŭ tiu, kiu insultos vin. Tial pensu en ĉiu tia okazo: li parolas aŭ agas laŭ sia kompreno.

* * *

Ne estu fiera pri boneco, kiu ne apartenas al vi. Se ĉevalo dirus arogante: „Mi estas bela“, tio estus pardonebla; sed se vi parolus fiere: „Mi posedas belan ĉevalon“, vi fierus pri la boneco de la ĉevalo. Kio apartenas al vi mem? La pensmaniero. Prave vi povos fieri tiam, kiam en ĝi vi agos ĝuste, ĉar tiam vi fieras pri bona eco, kiu efektive apartenas al vi.

* * *

Ĉe ĉiu negoco unue esploru detale, kio devas antaŭiri ĝin kaj kion ĝi alportas; nur poste komencu ĝin. Aliokaze, se vi ne pripensos la necesajn sekvojn, vi ko-

mencos kun bona volo, sed kiam malhelpaĵoj montriĝos, vi devos ĉesi kun honto. Vi volas ekzemple gajni premion en la olimpaj ludoj. Ankaŭ mi, pro Dioj! Ĉar tio estas gloriga. Sed unue pripensu, kio antaŭiras tian verkon kaj kio sekvas, poste komencu ĝin. Vi devas teni vin en severa disciplino, manĝi laŭ devigaj reguloj, eviti ĉiujn frandaĵojn, laŭ severa ordono ekzerci vin dum certaj horoj en varmego kaj malvarmo, trinki nenion malvarman, trinki vinon kun singardo, unuvorte, vi devas transdoni vin al la instruanto kiel al kuracisto. Poste vi devas paŝi sur la luktan kampon. Estas eble, ke vi disartikigos vian manon aŭ maleolon, englutos multe da polvo kaj fine estos venkata. Tion pripensu precize, kaj nur, se vi post tio ankoraŭ emas, fariĝu luktisto. Aliokaze vi agas kiel infanoj, kiuj lude prezentas luktistojn, jen skermiston, jen trumpetiston, jen aktoron. Tiel vi faras. Nun vi estas luktisto, poste skermisto, poste oratoro, poste filozofo, sed laŭ tuta via animo vi taŭgas neniel, sed vi nur imitas kiel simio tion, kion ĉiam ajn vi vidas, kaj plaĉas al vi unu afero post la alia. Vi komencis la agon ne kun konvinko kaj sufiĉa antaŭvido, sed sen pripenso kaj kun rapide remalvarmiĝanta avido. Kiam kelkaj vidas aŭ aŭdas filozofon paroli: „Kiel Euphrates scipovas paroli! Neniu lin egalas“, tuj ili ankaŭ volas studi filozofion. Homo, konsideru unue detale, kion postulas afero, kaj poste rigardu vin mem, ĉu via forto sufiĉas plenumi ĝin. Vi volas esti atleto en la kvin ludoj, aŭ luktisto; rigardu viajn brakojn, viajn femurojn, viajn lumbojn. Ne ĉiu homo estas kapabla por ĉio. Aŭ ĉu vi opinias, ke vi estante filozofo povus kiel kutime manĝi, trinki, koleri? Kontraŭe, vi devas regi vin, labori, apartigi vin de la amikoj, elporti malŝaton eĉ de sklavoj kaj malpretendi ĉion en honoro, oficoj, juĝejoj kaj ĉiuj negocoj. Konsideru, ĉu vi volas rezigni sen pasiecon, liberecon, firmecon, alie vi volus fariĝi kiel la knaboj, jen filozofo, jen financisto, jen oratoro kaj fine eĉ imperiestra prokuroro. Tiuj ĉi aferoj ne akordiĝas. Vi devas esti unueca homo, bona aŭ malbona. Vi devas perfektigi aŭ la plej noblan parton de via

persono (intelekton, prudenton, spiriton) aŭ la eksteran flankon, zorgi pri interno, aŭ malinterno, esti aŭ filozofo aŭ ordinarulo.

* * *

Se vi volas multe progresi en la saĝeco, paciencie toleru esti konsiderata pro eksteraj aferoj nesaĝa aŭ malsprita. Ne emu ŝajnigi sciojn kaj eĉ, se vi ŝajnas al aliaj iel saĝa, ne fidu vin mem. Ĉar sciu, ke ne estas facile zorgi samtempe pri la interna intenco kaj la ekstero, sed kontraŭe estas necese, ke tiu, kiu fervore dediĉas sin al unu el ambaŭ aferoj, devas malzorgi la alian.

* * *

Kiel oni fiksas celon ne por maltrafi ĝin, same la malfeliĉo ekzistas en la mondo ne por esti evitata.

* * *

Ne la aferoj mem, sed la opinioj pri ili maltrankviligas la homojn. La morto ekzemple estas per si mem nenio terura, aliokaze ĝi ŝajnus ankaŭ al Sokrates tia; pli vere, la antaŭjuĝo, ke ĝi estas io terura, estas timiga. Tial kiam io malhelpas, maltrankviligas aŭ malĝojigas nin, neniam ni kulpigu aliajn pro tio, sed nin mem, t. e. nian opinion pri tio. Pro sia propra malfeliĉo kulpigi aliajn, estas maniero de malkleruloj, kulpigi sin mem, tiu de la komencantoj, kulpigi nek aliajn nek sin, tiu de la kleruloj kaj bonedukitoj.

* * *

Vi estas malsaĝulo, se vi deziras, ke viaj infanoj, via edzino, viaj amikoj vivu eterne; ĉar vi deziras disponi pri io, kio ne estas en via povo. Same vi estas malsaĝulo, se vi postulas, ke via filo faru neniajn erarojn. Per tia postulo vi volas, ke eraroj ne estu eraroj sed io alia. Sed vi povas atingi la celon, ke nenio malprosperos al vi, se vi faras nur tion, kion vi kapablas.

Estro de ĉio estas tiu, kiu povas atingi aŭ eviti tion, kion li volas aŭ ne volas. Kiu volas esti libera, devas nenion deziri aŭ nenion timi, kio estas en la povo de alia homo; alie li estas ties servanto.

* * *

Konsideru tion: vi devas konduki en la vivo kiel ĉe festena manĝo. Se ĉe la tablo oni prezentas manĝaĵon, etendu la manon kaj prenu modestan pecon. Se io, kion vi manĝus volonte, ankoraŭ ne estas prezentata al vi, ne avidu ĝin, sed atendu, ĝis estos via vico. Tiel konduki rilate al viaj infanoj, edzino, honoraj oficoj, riĉeco; tiam vi estos iam inda gasto de l' Dioj.

Sed se vi prenos neniom de la prezentita manĝaĵo kaj indiferece preterrigardos ĝin, vi estos ne sole gasto, sed kunreganto de l' Dioj. Pro tia agadmaniero Diogenes, Herakleitos kaj aliaj efektive meritis la nomon „diecaj“, kiun oni donis al ili.

Esperantigis *Sincerulo*.

Artefaritaj Organismoj?

La sola substanco, kun kiu kuniĝas la fenomenoj de l' vivo, estas la protoplasmo. Sendube oni sukcesos arte produkti ĉi tiun protoplasmon, ĉar oni jam konas sufiĉe precize la materiojn, el kiuj ĝi konsistas. Kaj ankaŭ la reciprokan kvantoproporcion inter ĝiaj eroj oni konstato. Sed ĉiuokaze oni havos nur *malvivan* protoplasmon; ĉiuj konstatoj pri la konsisteco de l' protoplasmo rilatas al tia malviva materio. La ĉefafero — la vivo — estas esceptata. La vivo sin evidentigas ne nur per statoj, ekzemple per koloro, formo, denseco, pezo ktp., sed precipe per *agoj*. La vivo konsistas el almenaŭ 11 agoj: akceptado, transformado, eligado de materio, kreskado, moviĝado, incit-

eblo, valorigo de travivaĵoj (spertado), multobligado, transheredado, variemo kaj fine la kapablo, tiel funkciigi kaj reguligi ĉiujn nomitajn agojn, ke la konservado de l' vivo estas certigita. Ĉiuj faktoroj, de kiuj dependas tiuj agoj, jam estas entenataj en la protoplasmo t. e., en la substanco de l' ĉelo. Do ne nur sufiĉas arte konstrui la protoplasmon el ĝiaj elementoj, sed krom tio estas necese plenigi tiun malvivan, arte produktitan plasm-substancon per la faktoroj, kiuj kapablas *efektivigi* la nomitajn *agojn*. Ke en tio oni sukcesos, ne estas supozeble laŭ niaj ĝisnunaj scioj; restos prava la tezo de Dubois Reymond: »*ignorabimus*« (= ni ne scios).

Kiuza.